

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

IPR

Organo de Internacia Ligo
de Esperantistaj Instruistoj

ILEI

Jarkolekto 13

N-ro 3, 1983

Internacia Pedagogia Revuo – n-ro 3, 1983

Presado: Offset Massarosa, Tel. (0584) 93.090

Kompostado: Grafika Centro de Universala Esperanto-Asocio, Antverpeno

Enhavo

1. La XVIII-a konferenco de ILEI en Slovenio/Jugoslavio en la urbeto Škofja Loka de la 14-a ĝis la 21-a de aŭgusto 1984.
2. Internacia Lerneja Semajno en 1986 aŭ 1987.
3. a. Alvoko
b. Kelkaj notoj rilate al la instruado de Esperanto al kaj far blinduloj
4. Teknologia prezenteco en la nuntempa lernejo
5. Instruado pri bona stilo en la elementa kurso
6. Enpensiĝu, kolegoj
7. Propono de la estrarano pri financaj aferoj
8. Oficiala informo de la Akademio de Esperanto

J. Verheule, Nederlando

J. Verheule, Nederlando

J. Marevič, Jugoslavio

B. Golden, Hungario

A. Martin, Hispanujo

B. Andreasson, Svedujo

La XVIII-a Konferenco de ILEI en Slovenio/Jugoslavio en la urbeto Škofja Loka de la 14-a ĝis 21-a de aŭgusto 1984

D-ro Peter Zlatnar, kiu sendube tre atente observas la lingvan problemon ne nur en Jugoslavio, sed ĝenerale en la mondo, konstatas: „Ke la anoj de malgrandaj nacioj tion sentas pli akute estas kompreneble – la problemoj estas pli aktuala, kun pli da moralaj kaj financaj zorgoj.”

Tio estas sagaca konstato. Jam en nia 17-a konferenco en Sintra ni eksplikis, ke 57 etnaj lingvoj en Eŭropo nepre devas adaptiĝi al iu hegemonia lingvo, se kies anoj intencas profiti la ŝancojn, kiuj malfermos la konon de la angla, franca rusa aŭ de la germana lingvoj.

P. Zlatnar eldiras: „Ekzemple en Slovenio estas nuntempe plejparte instruataj de fremdaj lingvoj: angla (75%) kaj germana (25%). Pro troa ŝrumpo nur al du lingvoj, la lernejoj instigas pilariĝi la paletro de fremdaj lingvoj instruendaj en elementaj kaj aliaj mezgradaj lernejoj. La fakultativa enprogramigo de pluaj fremdaj lingvoj en elementaj lernejoj estas la unua paŝo farita tiucele.

La germana, itala, franca, angla kaj Esperanto estas momente la lingvoj elekteblaj laŭ propra deziro en elementaj lernejoj. Esperanto aperas ĉifoje kiel nova elemento de lingvo-instruado en lernejoj, tial mi provos prezenti la motivojn kiuj influis la decidon.”

Jen estas por ILEI alarma signalo se nun en Slovenio sur la lingva paletro estas prezentita Esperanto. Estas antaŭvideble ke nia konferenco por la lerneja evoluo de Esperanto en Jugoslavio estos tre utila. Ni okupiĝu detale pri la loko de Esperanto en la sistemo de la lingvo-instruado.

P. Zlatnar arigas la definitan celadon en unu programdokumento:

- la lernantoj akiru konon pri baza lingvostrukturo kaj ĝia laŭregula evoluo; kaj sur tiu scio
- konstrui pli firman startobazon por plua, pli efika lernado de sia gepatra nacia kaj ĉiu alia lingvoj;
- ili akiru kapablon logike kaj kompare priobservi la lingvaj regulojn,
- kapabliĝu parole kaj skribe sin esprimadi kaj legi literaturon,
- respekti kaj pliprofunde konatiĝi kun moroj kaj vivmanieroj de popoloj kaj naciecoj en la propra lando kaj en la mondo;

- ili kapablighu komunikadi en la senco de internacia toleremo, amikeco kaj humanisma internacieco
- kaj finfine la infanoj akiru idean kaj praktikan sentokapablon, egalrajte kontaktadi kun aliaj popoloj ĉu grandaj, ĉu malgrandaj kie ajn en la mondo.

Celante realigadi ĉiun supre diritan, ĉefas tri faktoroj kiuj influis la enprogramigon de Esperanto en fremdlingvan instruadon. Ni vidu kiuj estas tiuj tri faktoroj:

Dum prelego antaŭ instruistoj pri fremdaj lingvoj en Jugoslavio en septembro 1982 P. Zlatnar detaligis la socian pravigon de Esperanto en niaj lernejoj: „La problemo de lingvo-uzado, mallonge, la lingvoproblemo, restas la nesolvita problemo en internacia komunikado. Jugoslavia perspektiva orientiĝo al kunlaboro, kiu ne estas escepto, sur baze de neŭtralebloka, demokrata kaj egalrajteca sinteno unuflanke, kaj reciproka bezono flegi amikan najbarecan etoson ankaŭ en ĉiuj aliaj reciprokaj kontaktoj aliflanke, aktualigas ĉiam pli la problemon de lingva komunikado ĝenerale, en nia lando kaj en la mondo. Oni ja spertas, ke la instruitaj homoj sintrovas duonalfabetaj aŭ tute kiel analfabetuloj sur nivelo de internaciaj kontaktoj. Temas ja pri monda problemo de internacia lingva komunikado. Malgrandaj popoloj kaj iliaj lingvoj estas malatentataj, superregas la grandaj kaj fortaj. Tiun demandon priatentis la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Beograd 1980, kiu konstatis ke la nuna sinteno de superregado, ankaŭ sur lingva kampo, ne estas plu tolerebla. Unesko alvokis ĉiujn ŝtatojn rekonsideri la problemon kaj alpreni propran lingvopolitikon, laŭ kiu poste orientiĝu ankaŭ la instruado de fremdaj lingvoj.

La rezolucio kaj la konkludoj de Ĝenerala Konferenco konstatas, ke momente estas la plurlingveco la sola realeca solvo por la plejparto de ŝtatoj, sed ĝi samtempe aldonas, ke ĉiam pli larĝa uzo de unu sola nekomplika universala lingvo – kiun ĉiu homo povos kompreni kaj paroli, – povus unuflanke, firmigi la senton de aparteno al sia nacieca komunumo kaj aliflanke, samtempe forigis nunajn malfacilaĵojn en reciproka komunikado inter diversaj popoloj de la mondo. La proklamado de la jaro 1983-a ‚la jaro de internacia komunikado‘, konfirmas la socian pravigon ankaŭ por la enprogramigo de internacia lingvo Esperanto en la lernejan sistemon de fremdlingva instruado.

La enketo en Slovenio en la jaro 1972 atentigis, ke la granda plimulto (92%) de lernejoj esprimis la deziron, ke Esperanto estu instruata en ilia lernejo. La sama deziro estis esprimita en la enketo farita en 280 entreprenoj. Pri la krizo en la sistemo de fremdlingva instruado atentigis en sia analizo la Instituto pri lernejoj de socialisma respubliko Slovenio en la jaro 1978.”

Estos la tasko de nia konferenco pli science, lingvopolitike kaj didaktike-propodeutike distingi la Internacian Lingvon Esperanto de la ĝisnuna fremdlingva uzado kaj kutimiĝo sed samtempe enordigi ĝin en la sistemon de lingva instruado.

La estraro de ILEI kore invitas membrojn kaj amikojn de nia Ligo multnombre partopreni la XVIII-an konferencon. Ni restados en nova lerneja centro al kiu apartenas studenta domo, kiuj estos je nia dispono.

Kiom da kostoj? Bonvolu studi la enmetitan aliĝilon. Certe ankaŭ vi samopinias kun ni, ke ili ne estas grandaj.

Ne hezitu kaj resendu ĝin al la en la aliĝilo nomita adreso.

hso

Internacia Lerneja Semajno en 1986 aŭ 1987 projekto de I.L.E.I.

En julio 1887 eldonis d-ro L. Zamenhof sian unuan lernolibron pri Esperanto. Okaze de la centjara datreveno de tiu ĉi memorenda evento partoprenos la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj la elstaran celebradon organizante internacian lernejan semajnon.

Historia fono

La nun planata Internacia Lerneja Semajno (ILS) envicigas sin en jam okzintaj ILS-oj.

Pluraj geinstruistoj el Bulgario, Hungario, Italio, Jugoslavio kaj Aŭstrio kunvenis 1968 en Maribor (Ju) kaj nomis sin Kunordiga Pedagogia Konferenco – la unua de tuta aro de ĝi, por esplori kaj pridiskuti eblecojn kaj kondiĉojn organizi komunan lernejan eksperimenton pri Esperanto samtempe en la kvin landoj.

Evidentiĝis ke en ĉiuj kvin landoj en kelke da lernejoj Esperanto estis instruata.

Multnombraj interkontaktoj kun ŝtataj instruaj instancoj ebligis la trian konferencon – same en Maribor – en 1971. Havante ŝtatan aprobon, ĝi decidis pri la ekkomenco de kvinlanda lerneja eksperimento en la sama jaro.

Partoprenis 30 klasoj. Inter pluraj esplorceloj estis unu lingva, ĉu inter paralelaj klasoj – jen Esperanto kaj jen alia fremda lingvo¹ – kaj alia pli socia, ĉu dum la eksperimento starigitaj internaciaj kontaktoj estus evoluigantaj humanecan internaciismon.

Post trijara lerneja eksperimento finiĝis tiu ĉi periodo kaj pli ol 100 gelnantoj partoprenantaj la lernejan eksperimenton kunvenis en 1974 en la unua ILS en Primošten. Ĝuste la celo eduki lernantojn kaj instruistojn al humaneca internaciismo multflanke realiĝis.

Dua lerneja eksperimento okazis inter lernejoj en Francio, Germanio, Greklando,

1. Esperanto-klasoj havos pli da lingvaj avantaĝoj kaj infanoj pli efike lernos.

Belgio kaj Nederlando. Jen estis la demando kiagrade Esperanto povas esti orientiĝa lingvo en la elementa lernejo.

La eksperimento daŭris du jarojn.

Nur en Malsupra Saksio (Germanio) ĝi estis ŝtate permesita kaj registrita por tri elementaj klasoj, ĉiuj naŭ aliaj klasoj ricevis la instruadon en kromaj horoj.

Aparte menciinda situacio estis en Nederlando:

Kvankam Esperanto jam ekde 1968 estas nomita en la leĝo kiel fakultativa fako, la ministro pri instruado ne aprobis lerneajn eksperimentojn – tamen la partoprenintaj gekolegoj solvis la problemon je loka aŭ regiona bazo.

En majo 1977 okazis la dua ILS en St. Gerard: kunvenis 148 infanoj kaj 18 plenkreskuloj kaj ekvivi normalan instruadon – sed sur eŭropa nivelo. La moto de la lernejo por ĉiuj estis: Ni ne nur parolas pri Eŭropo – ni praktikas Eŭropon.

La nuntempa situacio

La spertoj kaj la centjara datreveno de la apero de Esperanto incitis la estraron de I.L.E.I. alvoki siajn membrojn partopreni en tria ISL. Se ĝis nun estis kunvenigitaj infanoj aŭ pli aĝaj gelnantoj loĝantaj en Eŭropo la estraro konsideras plivastigi la kadron inkluzivante infanojn kaj pli aĝajn gelnantojn el aliaj kontinentoj.

Necesas nun la preparoj je priatento de juraj kaj praktikaj cirkonstancoj en la diversaj landoj. La organizado postulas multe da fleksebleco.

Ĉar ĉiu lando de niaj preskaŭ 40 sekcioj havas aliajn problemojn rilate la instruadon oni devas ankaŭ sondi aliajn eblecojn por lingve prepari partoprenontajn infanojn kaj pli aĝajn gelnantojn.

Gvidlinioj

La unuaj lecionoj komenciĝu en 1985 en lernejoj aŭ en kursoj, sed oni limigu ne nur al nura lingva instruado. Jam de la komenco oni implicu la Universalajn Homajn Rajtojn, speciale la artikolon 26 kaj la Universalajn rajtojn de la Infano kiel principa bazo de la internacia instruado.

I.L.E.I. emfazas, ke internacia persona kontakto estas la kondiĉo por optimala sukceso je ĉiu nivelo.

Intencoj

- I.L.E.I. pere de ILS intencas,
- efektivi la supre menciitan kontakton por limigita nombro da infanoj kaj pli aĝaj gelnantoj,
 - ebligi al ili travivi internacian etoson kaj motivi la „internaciajn lernejanajn” hejme rakonti al samaĝuloj pri iliaj unikaj travivaĵoj;
 - cele inviti ĵurnalistojn, radiofoniajn staciojn, televidajn kompaniojn;

- fakajn reprezentantojn de la pedagogia, lingvistika publiko;
 sciencajn fakulojn de universitatoj havantaj specialan intereson je la evoluado de Esperanto kiel internacia lingvo en lernejoj;
 - zorgi pri kompilado de spertoj kaj ekkonoj dum la ILS, prezenti la materialon al instancoj kiel UNESKO, parlamentoj kaj ministerioj pri edukado el landoj el kiuj estis partoprenintoj de ILS.

Planadoj kaj ĉefpunktoj

1. dissendi flugfoliojn kaj alvoki ĉiujn membrojn de I.L.E.I. partopreni apoge aŭ aktive la ILS-n,
 - 1.1. atentigi pri la financa bezono kaj aŭ kooperative aŭ individue helpi kovri la kostojn,
 - 1.2. lanĉi artikolojn en la esperantistajn publikaĵojn, skribante pri la modela karaktero de la ILS,
 - 1.3. doni informojn pri la esenco de ILS al fakaj revuoj por geinstruistoj,
2. instruteknikaj demandoj
 - 2.1. por sufiĉe prepari la gelernantojn por la ILS necesas almenaŭ 160 instruhoroj distribuitaj al du aŭ tri studjaroj inter 1984 kaj 1986. (studhoro = 45 minutoj),
 - 2.2. prefere la instruado okazu en lernejoj sed ankaŭ eblas vesperaj aŭ posttagmezaj kursoj pere de instruantoj,
3. necesa lingva kono por la ILS
 - 3.1. kompreni la tekstojn de la studmaterialo kaj buŝe rerakonti,
 - 3.2. kapabli ekdiskuti, starigi kaj respondi demandojn.
 - 3.3. legi tekston kaj rerakonti ĝin, kunlige kun demandoj,
 - 3.4. senerare skribi proprajn elpensitajn tekstojn,
 - 3.5. skribi tekstojn laŭ diktado kaj esti certa en ofte ripetiĝantaj vortoj,
 - 3.6. kapabli memstare korespondi kun samaĝuloj en aliaj landoj,
4. la instrumaterialo:
 - 4.1. ĝia ellekto restu en la respondeco de la instruisto aŭ kursgvidanto,
 - 4.2. sed prefere li adaptu la vortmaterialon al jam elprovitaj internaciaj lernolibroj (vd. libroliston de UEA),
 - 4.3. por infanoj en Elementaj Lernejoj estas taŭga la prezentita vortmaterialo en 'Esperanto-Lerneja Eksperimento' (H. Sonnabend),
 - 4.4. alstrebanda estas proksimuma vorttrezoro de 1000 vortoj,
5. la ILS kaj ĝiaj partoprenantoj:
 - 5.1. partopreni povos infanoj ekde 10 jaroj (9) kaj pli aĝaj gelernantoj ĝis 15, lime 16 jaroj,
 - 5.2. la nombro estas strikte ligita inter 80 kaj 90 infanoj kaj pli aĝaj gelernantoj,
 - 5.3. laŭ starigota tabelo kiom da eblaj gelernantoj venu el unu lando, ĉiu lando parto-

- prenas proporcie,
- 5.4. ĉiu sekcio elektu la plej bonajn infanojn aŭ pli aĝajn gelernantojn laŭ lingva kono kaj konduto
 - 5.5. ĉiu sekcio aŭ lando kiu sendos infanojn aŭ gelernantojn por la ILS kunsendu instruiston kaj helpanton,
 - 5.6. por la ILS estas antaŭvidita 24 studhoroj kiuj enhavas jenajn temojn:
 - 5.6.1. unu homa familio (kadrotemo) kaj unu dua lingvo
 - 5.6.2. urboj en la mondo
 - 5.6.3. kie la homo malsatas
 - 5.6.4. popolaj kantoj, popolaj dancoj
 - 5.6.5. vojaĝo kaj ŝanĝo de la mono
 - 5.6.6. konkursa pentrado: impresoj el la ILS
 - 5.6.7. la ILS olimpiadas (SPORTAJ KONKURSOJ),
 - 5.7. ekskursoj kaj akceptoj
 - 5.8. ILS okazos en klasoj aŭ en komunaj aranĝoj
 6. okazaj bultenoj raportas kaj informas pri
 - 6.1. stato de la preparado
 - progresoj kaj eventoj
 - efektivigoj
 7. respondecoj:
 - 7.1. I.L.E.I.-komisiono respondecas organizadon kaj realigadon de la ILS, (ĝi estos nomita far de estraro),
 - 7.2. Sekcioj respondecas la preparon kaj partoprenigadon de gelernantoj,
 - 7.3. CEVNO (Centro por Internacia Edukado) respondecas la administran plenumadon de ILS.
 8. rimedoj
 - 8.1. Sekcioj fondu fondusojn por finance ebligi al siaj ILS-anoj la vojaĝon al ILS,
 - 8.2. La Ligo fondu fonduson per kiu estu pagita la kostojn de ILS.
 - 8.3. CEVNO klopodos havigi rimedojn por la tutaj kostoj
 - 8.4. kiel eblaj fontoj estas esplorendaj:
 - UNESKO en Parizo
 - naciaj UNESKO-komisionoj
 - naciaj kaj internaciaj Instruistaj Sindikatoj
 - organizaĵoj kiuj deziras akceli la instruadon de Esperanto
 - privataj personoj
 9. Buĝeto estos ellaborenda inter CEVNO kaj I.L.E.I.

Kelkaj notoj rilate al la instruado de Esperanto al kaj far blinduloj

F. Verheule

Alvoko

Per ĉi-tiu alvoko mi petas vian atenton por la jena.

En Nederlando, tri el la membroj de la nacia branĉo de ILEI, do tri legantoj de IPR, estas blindaj, kiu kaŭzas, ke la legado de nia revueto renkontas malfacilaĵojn. Se en aliaj landoj estas ILEI-membroj, kiuj havas la saman malhelpon, ili bonvolu turni sin al mi, tial ke ni post kelke da tempo havos ideon, kiom da blindaj ILEI-anoj ekzistas, kaj kie ili loĝas.

Ankaŭ mi volus ricevi entute tri nomojn de ILEI-anoj, kiuj pretas unufoje jare sonbendlegi IPR-on sur kasedon, tiel ke ni, en Nederlando, povus multobligi tiun kaj sendi sonkasedon al ĉiuj interesuloj.

Estas plej facile, rekte skribe turni al mi. J. Verheule, Jachtlaan 232, NL 7312 GR Apeldoorn.

Jam je la komenco de la esperantomovado, blinduloj ludis en ĝi rolon, kelkfoje eĉ gravan rolon. Jam en la unuaj jaroj de la historio de Esperanto, en Hago, Nederlando, loĝis la vere unua blinda Esperantisto, Nikolaso Schildt, kiu i. a. ankaŭ estis unu el la fondintoj de la Nederlanda Blindulbiblioteko, kaj de la Nederlanda Blindul-Unuiĝo. Do, jam en 1887 eblis, ke blindulo, same kiel alia persono, lernis kaj praktikis Esperanton.

Tiu estas grava fakto. Oni konsciis tion en la movado, ĉar jam en la dua UK, en Ĝenevo en 1906, oni akceptis rezolucion, kiu konstatis, ke Esperanto kaj la blinduloj havas certe ligojn, ĉar Esperanto povos helpi la blindulojn elrompi el ilia isoleco, kiu en tagoj en kiuj ankoraŭ ne ekzistis radiofonio estis multe pli granda ol nun. Oni ankaŭ

fiksis kelkajn specialajn regulojn rilate al blindaj esperantistoj, kiuj i. a. ĝis la hodiaŭa tago rezultis en la t. n. 'blindula kaso' de UEA. Tiu kaso helpas blindulojn en kazoj, en kiuj la studado de la lingvo kaŭzas grandajn kromajn kostojn, kaj ĝi ankaŭ helpas en kelkaj aliaj vivkampoj. Tio ne donas al la blinduloj apartan statuson inter la esperantistoj, ne, kontraŭe, foriginte kromajn kostojn, ĝi donas al la blinduloj la normalan plenan lokon inter la aliaj samideanoj.

Dua grava helpilo al blinduloj estas la fakto, ke ili rajtas sendi siajn specialajn poŝtaĵojn senpage.

Tio rilatas al brajlaĵoj, kune kun presaĵoj en la nur anglalingva t. n. 'Moon'-blindulskribo, sed ankaŭ al gramofondiskoj, kaj al sonbendoj. Tamen, pri la lastaj estas fiksitaj, ke oni nur rajtas forsendi sonbendojn brajle, se ili iras aŭ venas al aŭ de oficiala instanco en la blindulkampo. Kaj tie estas la unua tuŝo al la instruado. Se temas pri blindulo en la instruado de Esperanto, kaj ĉu la lernanto, aŭ ĉu la docento loĝas en diversaj urboj, ili povas regule interŝanĝi la lecionojn sed kondiĉe se la adreso montras klare ke unu el la du estas en la blindul-aferoj. Do, estas tre utile en tia kazo kontakti la nacian delegiton de la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj, aŭ, se tia persono ne estas en via lando, kontakti pri tio la internacian sekretariion de tiu ligo, kies adreso estas:

f-ino N. Lozajiĉ, Lepe Stamenkovic 9, Mišbička Banja, YU-31060 BEOGRAD

Ŝi certe povas informi vin pri la plej taŭga persono en via lando por kontakti en la afero.

Tre verŝajne unu el la du jam longe scias pri LIBE, kaj tiam la kontakto inter la du ne kaŭzas malfacilaĵojn.

Oni ne prenu iun specialan libron, se temas pri instruo al blinduloj. Oni prenu la plej bonan lernolibron en la lando, kaj klopodu havi brajlan ekzempleron de ĝi. Tio ne ĉiam jam ekzistas, oni povas, en kelkaj landoj, peti blindulbibliotekon fari la brajlaĵon, sed oni ankaŭ povas, helpe de iu persono kiu majstras la brajlan skribadon, 'transmeti' la libron en brajla skribo, tial ke la persono kiu bezonas ĝin havu la saman libron kiel la aliaj lernantoj. Antaŭe vi devas scii ĉu la blindulo vere majstras la brajlan skribon, ĉar multe da personoj, speciale se ili blindiĝis en plenkreska aĝo, ne aŭ ne sufiĉe povas legi brajlon. Skribi, jes, sed legi, ne. Ankaŭ ĉi-tie la landa delegito de LIBE certe estos bona gvidanto.

Estas ĉiam konsilinde konscii, ke tiuj kiuj blindiĝas je neĵuna aĝo, havas multe da peno bone lerni la brajlan skribon kaj la tajpadon. Do, se eble, vi faru kun ili la lecionojn plej eble buŝe. Grandan helpon vi povas havi tiukaze per la magnetofono. Ankaŭ tiuj kiuj, kiel junuloj, bone lernis tajpi, ofte post la 50-a jaro perdas parton de sia lerteco, neniam postulu tajpadon kiun la lernanto, havante nun du malfacilaĵojn, nome la lingvon kaj la skribadon, simple ne aŭ ne plu povas prezenti.

Tamen, ankaŭ li havas la homan rajton, tiel bone kiel eble, lerni la lingvon, do vi

ĉiam konsciu ke la metodo kaj la libroj servu la studadon, ne kontraŭe.

Serve al la studado, en kelkaj landoj jam pli longe ekzistas eblecoj havigi la lernolibrojn brajle aŭ sonbende, kaj la bonega lernolibro por progresintoj, 'Paŝoj al Plena Posedo' de W. Auld, estas havebla kaj sonbende kaj brajle. Por la unua eldono vi turnu vin al la Blindulbiblioteko Le Sge ten Broek, Poŝtfako 30012, NL-6503 HP NIJMEGEN, Nederlando, kaj por la brajla eldono vi plejbone povas sekvi jenan vojon: Por havi la libron kiel proprajon vi transmetu la kontraŭvaloron de Nf 70,- al ĝirkonto 1916130, nome de Nosobe Roosdorp Studiefonds, Apeldoorn, Nederlando, kaj vi - aŭ la blinda interesulo - ricevas la libron kiel proprajon. Se li aŭ ŝi estas membro de LIBE aŭ de unu el ĝiaj landaj asocioj, la kostoj estas Nf 50,-. Se via lando ne havas ĝiran sistemon, vi iru al via banko kie oni certe scias kiel manipuli la aferon.

La suprenomita blindulbiblioteko estas unu el la plej grandaj en la tuta mondo, povante liveri brajlajn kaj sonbendajn esperanto-legolibrojn. Flanke de ĝi mi povas nomi la bibliotekon de la Royal National Institute for the Blind en Londono, kaj la Library of Congress en Washington, Usono. Ili sendas librojn tra la tuta mondo.

Ŝajnas plej utile al mi, nun prezenti eblecojn de la instruado:

a. Blindulo instruas blindulon.

Ili ambaŭ devas havi libron, se nur ekzistas unu libro, la lernanto plej bone prenu ĝin. Li lasu ĝin hejme ĉe la instruanto post la leciono, dume kunprenu la lecionon, registritan sonbende. Ĉiukaze tio estas konsilinde, se la lernanto ne kontraŭstaras. Do, la tuta leciono estu surbenda, li povas retravivi la lecionon hejme, kaj sur la sama bendo aŭ sur alia, enparoli sian tradukon ktp. Ĝi ne nur donu la taskojn, sed same ebligu al li kaj al la instruanto, poste kontroli la prononcon. Se ili ne loĝas en la sama urbo, ili povas fari la tutan aferon proprahejme, kaj uzi la poŝttrafikon por interŝanĝi korektojn kaj novajn lecionojn.

b. Blindulo instruas vidanton.

La instruanto posedu laŭeble brajlan libron - kaj la lernanto 'normalan' libron, li legu la tutan lecionon laŭte, tiu legado jam estas parto de la leciono, ĉar ĝi instruas lin pri la prononcado, kaj donas okazon, preparoli la legitaĵon. Ankaŭ nun vi surbendigu la tutan lecionon. Se vi ne loĝas en sama urbo, agu kiel sub a.

c. Vidanto instruas blindulon.

Se la blindulo havas kaj majstras brajlan libron, la afero disvolvigas kiel ĉe vidantoj 'inter si'. Nur la fardo de la tasko kaŭzas iom da malfacileco. Vi povas solvi ĝin, se vi kiel instruanto ne kapablas legi brajlon - okule aŭ fingre - per la nura sonbendigado de la leciono far la studanto. Ofte malbonvidantoj ankoraŭ povas skribi normalan tekston, eble pli granda ol kutime, sed legebla. Vi, kune kun via lernanto, trovu solvon.

ĉ. Blindulo kiel lernanto inter vidantaj lernantoj.

La blinda lernanto havu la saman libron kiel la aliaj, aŭ havu nenion libron kaj surbendigu la lecionon. Memkompreneble li ankaŭ povas fari tion, se li havas libron. Li

partprenu en la leciono kiel la aliaj, li faru la taskojn tajpe aŭ sonbende, kaj tiamaniere estu normala lernanto inter normalaj lernantoj. Entute, vi povas konkludi ke la afero praktike ne estas tre malfacila, sed necesas trovi kelkajn malgrandajn modifojn inter kiuj estas kelkaj havantaj ĝeneralan karakteron, sed ankaŭ kelkaj aliaj oni povas solvi kune kun la blinda samideano, kiun vi, kiel instruanto aŭ kiel instruato, regule kontaktas en la studo. Kaj, ne forgesu, la landa delegito de LIBE, aŭ persono kiun li-ŝi indikas, povas esti grandhulpulo al vi kaj al la blinda interesulo.

Teknologia prezenteco en la nuntempa lernejo

Jozo Marević

Resumo

Ĉiu foresto de la moderna tekniko el la nuntempa lernejo signifus, ke la tekniko kaj klerigo tute disiras kaj ke la rapida evoluo de tekniko kaj scienco estus por la klerigo senutila. Kianivele estas kaj estos uzata la moderna kleriga teknologio en la lernejoj, dependas de multaj faktoroj, sed antaŭ ĉio, tio dependas de la instruistoj.

Kvankam en multaj ŝtatoj kaj regionoj ekzistas reguloj kaj normativoj pri la uzo de la kleriga teknologio (en ĉi tiu artikolo estas konsiderata normativo pri la aŭdvida tekniko en Socialista Respubliko Kroatio), ankoraŭ foje montriĝas, ke la oficialaj normativoj en la ĉiutaga praktiko ne gravas multe. Du enketoj faritaj en socialistaj respublikoj Kroatio kaj Bosnio kaj Hercegovino montras, ke la lernejoj koncerne la klerig-teknologion (instrurimedoj kaj -helpiloj) estas varie ekipitaj. Ekipecoj de la lernejoj en la unuopaj studobjektoj dependas, sendube, de la instruistoj mem kaj de ilia preteco utiligi la teknikilojn dum la instruprocedo.

Menciinde estas, ke la elektronika lernoĉambro estas ĉiam pli forgesata. Anstataŭ ĝi pli grandan rolon ricevas la multimediuma centro.

Planante estontecon estas tre utile pritaksi la nuntempan staton, je kia grado oni uzas la instrurimedojn, aŭvidan teknikon en la lernejoj. Tiel surbaze de „Normativoj pri ekipo por realigo de bazoj de la instruplanoj kaj programoj por la mezlerneja klerigo” (Klera heroldo, numero 7, 1973) kaj laŭ programo de Instituto por antaŭenigo de la faka klerigo de SR Kroatio por la jaro 1974, estis farita enketo pri la stato de la instrutekniko en la mezlernejoj. Per analizo aŭ enketo estis ampleksitaj ĉiuj mezaj lernejoj en SR Kroatio, kaj 221 lernejoj aŭ 60% resendis siajn respondojn.

Pritaksante ekipojn per la instrurimedoj kaj -helpiloj, realajn eblecojn kaj kontentgradon pro tio, oni laboris tiakriterie, ke estu respektenda la sekvanta


NORMATIVO
pri la aŭd-vida tekniko
(Klera heroldo, Zagreb, &/1973)

Helpilo	Numero da lernoĉambroj pecoj (eroj) da instruhelpiloj					
	10	10-15	16-20	21-25	26-30	> 31
1. Televidilo	1	1	2	2	3	3
2. Radiilo	1	1	1	2	2	2
3. Kino-projektoro	1	1	1	2	2	2
4. Grafoskopo	3	4	5	6	7	8
5. Dia-, epi- & epidie- projektoro	3	4	5	7	8	9
6. Magnetofono	3	4	5	6	7	8
7. Gramofono	1	1	1	2	2	2

Sen la menciitaj instruhelpiloj, oni konsideras, ke unu lernejo devas posedi 1-3 sistemkomunikatilojn, minimume unu multobligaparaton, 3 specialigitajn instruejojn (se estas nur 2, temas pri la stato sub minimumo, se estas 4 aŭ pli, temas pri la stato super minimumo) k. t. p.

La 1-a figuro montras procenton de la lernejoj, en kiuj ekipaĵoj de la unuopaj studobjektoj permesas minimumon, ĝuste kontentigas aŭ estas super tiu minimumo rilate al la menciita Normativo. Oni povas, prima vista, klarvidigi, ke la plej bonaj ekipaĵoj estas en matematiko kaj en kroat-serba lingvo (super 87%). Por la serb-kroata lingvo la ekipo per instruhelpiloj estas super la ordonita minimumo en 17,65% de lernejoj, por la matematiko en 14,48% de lernejoj. Por la geografio estas 86,06% de lernejoj provizitaj per la instruhelpiloj, por la historio 83,26%. En pli ol 70% de lernejoj kontentige, pli bone dirite, responde al la enketilo, estas provizitaj sekvantaj studobjektoj: fremdaj lingvoj, kemio, fiziko, defendo kaj gardo (72,85 ĝis 74,66% de lernejoj).

Ekipaĵoj de la studobjektoj: fundamentoj de marksismo, arto, korpedukado plenumas minimumajn postulojn en 62-68,32%. laŭ la grafika prezento videblas klare, ke plej malbona provizumado per la instruhelpiloj estas en studobjektoj: teknika klerigo,



1-a figuro: Ekipo de la lernejoj en la unuopaj studobjektoj


biologio, fakaj studobjektoj kaj praktika instruado.

Ankaŭ estas akcentinde, ke la menciita enketo estis farita tempe de vagado kaj serĉado de plej bonaj instruprogramoj por studobjekto de teknika klerigo. Nuntempe, kiam la klerigreformo ege revoluciigis opiniojn kaj juĝojn kaj, sekve de tio ankaŭ instruprogramojn de la unuopaj studobjektoj, reale estas atendi, ke la lernejo ekestas plej ekipita per la instruhelpiloj ĝuste en la studobjekto teknika klerigo. Oni supozas, ke nuntempe 90% de lernejoj kontentigas postulojn por la instruprocodo de la studobjektoj teknika klerigo kaj praktika instruado.

Surbaze de la esploroj pri la ekipeco de la lernejoj en Bosnio kaj Hercegovino (Vladimir Erceg, *Nastavnik u savremenost nastavi*, Svjetlost, Sarajevo, 1979, p. 101) faritaj fine de la jaro 1975, kiuj ampleksis 143 lernejojn (lernejaj centroj, gimnazioj), oni konstatis, ke eĉ 107 lernejoj aŭ 74% posedas bibliotekon sen la apuda kazino. Pli ol 50% de lernejoj ne havas responderon, fotokopiadaparaton, vid-kasetojn kaj fonolaboratorion. Per la sama enketo oni firmigis, ke en la mezlernejaj centroj de Bosnio kaj Hercegovino ne ekzistas modernaj instrurimedo kiel maŝinoj por la programita instruado, televido de la fermita cirklo, instrukomputeroj, elektronikaj instruĉambroj. 40% de mezlernejaj centroj agas en la adekvataj kaj konvenaj konstruaĵoj kaj same tiel multe da ili ne havas adekvatajn ejojn. Sur la 2-a figuro estas videbla ekipaĵoj de la lernejoj en SR Kroatio per la instrutekniko. Sur la unua loko troviĝas gramofono. Sekvas radiiloj, multobligaparatoj, televidiloj, epidiaskopoj k. t. p. La gramofonnumero estas en 67,73% de lernejoj super la minimumo, samtempe nur 30% de lernejoj posedas kontentigan nombron da magnetofonoj. La komunikatorsistemon havas nur 27,27% de lernejoj kaj, kio ege miraklas, nur 17,27% de lernejoj kontentigas rilate al grafoskopnumero. Tute neklarigeble estas, kial tiel malmultnombraj en la lernejoj estas grafoskopoj, relative malmultekosta instruhelpilo kaj, aliflanke, por la intensifigo de la instruprocodo ofte plej dankema kaj plej taŭga teknika helpilo.

Krom la pli malnova tekniko (gramofonoj, radiiloj, diaprojektoroj) la plej atraktiva instruhelpilo, televidilo estas kontentige reprezentata en 77,73% de lernejoj. Sed en pliparto de lernejoj la televido estas malofte uzata, ĉar, laŭ opinio de instruistoj, lerneja horaro kaj televida programo disiras kaj ne estas ligeblaj. Oni supozas pro tio, ke ĝuste pro tia kolizio de la televidaj elsendoj kaj lerneja hortabelo la fruktodonan aplikon de la televido en la lernejoj ebligis magnetoskopo, per kiu oni povos enladigi la televidajn elsendojn kaj uzi ilin laŭ la bezonoj kaj eblecoj de la instruprocodo. La magneto-skopa tekniko estas ankoraŭ ĉiam multekosta, sed jam komence de la 70-aj jaroj 15 mezlernejaj centroj aŭ 6,82% posedis ĝin.

Longjare oni prijuĝis, ke la elektronikaj lernoĉambroj estas optimuma atingajo sur la kampo de la kleriga teknologio. Multaj pritaksas tiamaniere ankaŭ nuntempe, kvankam oni agnoskas la fakton, ke la instruado en tiaj ejoj estas ege multekosta. Ĝis la komenco de la 70-aj jaroj en Jugoslavio estis instalitaj elektronikaj lernoĉambroj.



2-a figuro: Ekipeco de la lernejoj per la instruhelpiloj

La elektronika lernoĉambro estas tamen moderna instrurimedo kaj la instruado en ĝi estas atraktiva, interesa kaj alloga. La elektronika lernoĉambro ebligas „direktadon per la instruprocedo, kiu similas al ‚la klasika‘ instruatipo, sed helpo de la plej modernaj teknikaj aparatoj por la informtransfero kaj -prilaboro kaj helpo de utiligo de iloj por memorado pri la rezultoj de la lernantoj.”¹

La elektronika lernoĉambro certigas evoluadon en la labordaŭro de la lernanto, pli da ebleco kaj tempo al la instruisto por preparado, celdirektado kaj kontrolado de la instru- kaj lernoprocedo, pli facilan komunikon kun la lernantoj, pli efikan bezonatan helpon kaj pli kompletan objektivecon en la taksadprocedo de la lernantoj kaj de ilia ĉiutaga laboro.

David M. Crossman, kiu multjare okupiĝas pri la problemaro de la elektronika lernoĉambro, substrekas, ke plej granda avantaĝo de la elektronika ejo troviĝas en tio, ke la lernantoj povas labori kun la instruistoj je tre diversspeca scinivelo kaj per variaj instrulertecoj, kaj ne nur per unu sola, kiamaniere oni laboras en la kutima lernoĉambro.²

Spite al pozitivaj juĝoj pri la elektronikaj lernoĉambroj, simple ni estas konsternitaj pri la fakto, ke la mezlernejaj centroj montras tiel malmulte da intereso pri ili. Ekzistas ankaŭ malmulte da volo kaj preteco ĉe la instruistoj pligrandigi la nombrojn da la elektronikaj lernoĉambroj. Laŭ la ĝisnunaj esploroj la kialo de tia stato estas serĉenda en la neinformiteco de la instruistoj pri inovacioj. Plejparto de la enketitoj, eĉ 70% ne konas la ĉefinovaciojn en la instruado, kiuj hodiaŭ estas aplikataj, 37% de instruistoj tre malbone estas ekkonitaj pri la instruinovacioj, 33% malbone kaj entute 12% de enketitoj estas bone informitaj pri la instruinovacioj.

Beltz, Basel, 1974.

Referencoj

1. Fabijan Radonić, Objektivni faktori nastave – ignovacije, Zavod za prosvjetno-pedagošku službu, Zagreb, 1977, p. 85.
2. David M. Grossman, The Electronic Classroom, New York, 1964, p. 5-7.
3. Vladimir Ercag, Nastavnik u savremenoj nastavi, Svjetlost, Sarajevo, 1979, p. 105.

Alia literaturo

4. Albert V. Baez, L'innovation dans l'enseignement des sciences: synthèse mondiale, UNESCO, Paris, 1977.
5. Richard N. Tucker, The Organizations and Management of Educational technology, Croom Helm, London, 1979.
6. M.G. Caputo, Le tecniche audiovisive nell' insegnamento, Società Editrice internazionale, Torino, 1976.

7. Arnold Frö'ich, Die auditiven, visuellen und audiovisuellen Unterrichtsmittel, Beltz, Basel, 1974.
8. W. Wittich, Audio-visual Materials: their Nature and Use, New York, Harper and Brothers, 1962.
9. M. Valeri kaj C. Betti, I mass media e l' educazione, Le Monnier, Firenze, 1976.
10. Fred J. Pula, Application and Operation of Audiovisual Equipement in Education, New York, 1968.
11. Vladimir Mužić, Kibernetička istraživanja u suvremenom odgoju i obrazovanju, PKZ, Zagreb, 1978.

Rimarkigo

Kiam Zamenhof kreis sian lingvon, ĝi estis konsiderata por ĝenerala lingva komunikado. Sed tekniko kaj scienco rapide eksaltis antaŭen kaj aŭtoro kiu luktas apliki trafikajn terminojn ne malofte scias kiel esprimiĝi.

La vortaro (PIV) estas konsiderinde dika kaj entenas multnombrajn vortojn uzablaj por formi eĉ komplikajn terminojn. El la traktato de la kolego mi notis kelkajn de li uzitajn nociojn. Mi nomas ilin al vi je diskutado. Bonvolu skribi al IPR!

normativoj, multimedia, radiilo, projektoro, epidaprojektoro, sistemkomunikatiloj, prima vista, komunikatorsistemo, magnetoskopo, kazino, respondero, intensifigo, enladigi

hso

Instruado pri bona stilo en la elementa kurso

Bernard Golden

En la plej multaj Esperanto-kursoj kaj lernolibroj la temo de stilo apenaŭ ricevas adekvatan pritrakton, ĉar la emfazo estas sur parkerigo de gramatikaj reguloj kaj enkapigo de vortoj. Eĉ la prononcado lamas, se la instruanto mem ne flue kaj ĝuste parolas en la internacia lingvo, uzante etnolingvan prononcmieron kaj intonacion. Ĉi-rilate oni povas reliefigi ankaŭ stilajn difektojn en la skriba Esperanto, kiuj rezultas el miskompreno pri la ĝusta kunmeto de frazoj kaj ankaŭ pro influo de fraz-konstruoj karakterizantaj la gepatran lingvon.

Eĉ sur la elementa nivelo de lingvoinstruado oni devas atentigi lernantojn pri la diferenco inter klara kaj facile komprenebla Esperanto kaj nenece komplikaj, nebulaj esprimmanieroj. Oni povas montri ekzemplojn de fuŝe kunmetitaj frazoj, klarigante, kial tia lingvouzo estas evitenda. Ĉi-sube mi donos kelkajn ekzemplojn de stilaj malglataĵoj, kiuj povas esti facile ĝustigitaj de kursanoj aŭ aŭtodidaktaj lernantoj uzantaj nur lernolibron. Tri citaĵoj estas ĉerpitaj el la sama verko por montri, ke ne temas pri preseraro sed pri vera stila trajto de la koncerna aŭtoro aŭ tradukinto.

A. Demandaj frazoj kaj la uzo de ,ĉu' (*Misio sen Alveno*, John Francis)

1. „Vi volas provi la ĝangalon, ĉu?” Kaŭser demandis. (p.94)
2. „Vi finos vian projekton hodiaŭ, do?” diris Halman, jam sciante la respondon. (p.15)
3. „Vi insistis pri komento; ĉi tiu kontentigas vin?” (p.69)

En la unua frazo, la demanda adverbo ,ĉu' venas, ne en la kutima loko ĉe la komenco de la frazo, sed ĉe la fino. Okupas la saman pozicion en citaĵo 2 la partikulo ,do', kiu nur neprigas demandon; ĝi ne funkcias kiel ,ĉu'. Tute mankas demandaj vorto en la tria frazo. Estas evidente, ke nu per la demanda signo ,?' estas eble scii en frazoj 2 kaj 3, ke temas pri demando. En la unua la leganto devas atendi ĝis la fino por vidi, ke la demando estas indikita per ,ĉu', kiu fakte faras redunda* la demandan signon. En la parolata angla lingvo, kiu estas la gepatra lingvo de la aŭtoro, estas eble indiki deman-

don per intonacio, sed en Esperanto ne estas internacia normo por intonacio, kaj, cetere, en skriba teksto ĝi apenaŭ estas senambigue indekebla. Por eviti dubojn estas necese komenci ĉiun demandan frazon aŭ per ‚ĉu‘ aŭ per unu el la demandaj vortoj (pronomo, adjektivo, adverbo) troviĝantaj en la tabelo de korelativoj.

B. Manko de pronoma subjekto (*La Naŭa Kanalo*, István Nemere).

1. „Post kvar minutoj mi devos esti en la studio” – pensis ĉagrene. (p.60)
2. Li rigardis al siaj fingroj. Rememoris, kion skribis antaŭ nelonge muzikkritikisto de iu gazeto. (p.45)
3. „Via mondo ankoraŭ nenion scias pri la ekzisto de diversaj tempokampoj... Kaj pli bone estos, se dum longa tempo ankoraŭ nenion ekscios pri tiu temo.” (p.101)

La cititaj frazoj lamas, ĉar en ĉiu mankas pronoma subjekto antaŭ verbo. En la unua frazo oni devas skribi ‚mi pensis‘, en la dua ‚mi rememoris‘, kaj en la tria ‚ĝi ekscios‘. En Esperanto nur unu finitiva verbformo estas uzebla sen pronoma subjekto – la volitivo. La klarigo, ke en la cititaj ekzemploj temas pri elipsaj konstruoj, ne estas apogebla. Oni ne rajtas oferi klarecon por atingi koncizecon, ĉar estas aliaj rimedoj fari tion. Manko de verba subjekto signifas, ke leganto devas retrolegi, ĝis li estas certa pri la subkomprenata subjekto.

C. Interrompita vortordo (*Pollando – Nombroj kaj faktoj*)

1. Pri la valoroj de la internacia lingvo kaj utila agado de esperantistoj esprimas sian opinion en la filmo, tre pozitivan, la eminenta pola sciencisto... (p.68)
2. Grandan popularecon ĝuas, gvidata de la Ĉefa Estraro de PEA, konstanta koresponda kurso de Esperanto... (p.67)
3. Pollando estas la dua laŭ la grandeco konata en la mondo eksportanto de karbo. (p.44)

Tiuj ĉi frazoj sendube estis tradukitaj el la pola lingvo aŭ verkita de polaj esperantistoj, kiuj ne povis liberigi sin de esprimmanieroj de la gepatra lingvo. En ĉiu frazo aperas aro da vortoj, kiu ne staras tuj apud la aliaj vortoj en la frazo, al kiuj ĝi laŭsence rilatas. Jen kiel la vortordo povas esti ĝustigita, por ke la senco estu pli klara.

1. Pri la valoroj de la internacia lingvo kaj utila agado de esperantistoj, esprimas sian opinion tre pozitivan en la filmo de la eminenta pola sciencisto...
2. Grandan popularecon ĝuas koresponda kurso de Esperanto, gvidata de la Ĉefa Estraro de PEA.
3. Pollando estas vicorde la dua plej granda eksportanto de karbo en la mondo.

Ekzemploj de fuŝa stilo troviĝas en ĉiuspecaj publikigaĵoj, eĉ en lernolibroj. Estas konsilinde, ke instruantoj rimarkigu ilin kaj donu al siaj lernantoj taskon reverki la frazojn, por ke ili estu pli klaraj, pli internaciaj, pli Esperantaj.

* I.P.R. ne trovis la vorton ‚redunda‘ en PIV. Kiu helpos?

Enpensiĝu, kolegoj!

Andrés Martín

Senĉese oni aŭdas komentariojn rilate la enkondukon de Esperanto en la publikajn instituciajn Centrojn de Edukado. Ĉiuj bedaŭras la malatenton kiun montras la koncernaj naciaj instancoj pri nia Movado. Ili akceptas Zamenhofan Lingvon teorie sed, praktike, forgesas ĝian gravecon. Preterpasante aliajn rimarkindajn nuancojn – ekzemple, la manko de kapablaj profesoroj – kiuj malhelpas certe la enkondukon de Esperanto en la lernejojn, mi ŝatas taŭge reliefigi iujn aspektojn de la nuna edukado. Eble la graveco de la lernejo rilate la disvastigon de Internacia Lingvo ne estas tiel grandega kiel ne malmultaj asertas.

Kiel progresiva faktoro kiel instituciaj publikaj Centroj de Edukado ili tre ofte malsukcesas, ĉar multfoje ilia agado konsistas nur en la justigo de iu aktuala politiko kaj kultura situacio. Lernejo estas konservativa kaj, ne havas propran ideologion. Kontraŭe, ĝi estas servisto de partioj, religioj kaj de kutimoj estigitaj en aliaj sociaj rondoj. Ĝi celas instrui kaj eduki. Tamen, rilate instruadon, memvideble, ĉiam ĝi iras malantaŭ kaj, rilate edukadon, ĉiutage ĝi cedas pli kaj pli sian rolon al ceteraj. Nek profesoroj, nek pedagogoj povas sukcesi kontraŭ la cirkonstancoj, ĉar neniu el ili kondukas la mondon. Ĉi tiu estas gvidata de ekonomiaj; laikaj kaj pragmatismaj fortoj.

Neniu projekto de edukado prosperos ĉar neniu homo povas sekure kaj certe programi por la estonteco. Se sukcesus, estus tute hazarde. Ni piediras blinde kaj neniu povas diveni la okazontaĵojn.

Kvankam la edukado ĝuas la valorojn kaj la kvalitojn kiujn al ĝi ‚donacas‘ la socio, sed la atenditajn rezultatojn oni perceptas nenie. Ni povas konstati senĉese, ke la aŭtentikaj edukistoj estas la ĵurnalistoj, la ĉefoj de la politikaj partioj, la kinaj kaj teatraj geherooj, la radiofonio, la televido, la strato mem...

Bedaŭrinde, mi ne povas enmeti la Eklezion en ĉi tiun liston. La religiaj respondeculoj ne estas profitantaj sufiĉe la ŝancon, paroli al popolo per la nunaj amasmedioj de nia socio.

Estas necese faligi la miton de la senlima valoro de la lerneja edukado, ĉar hodiaŭ ĝi pretigas la personon por la estonteco nur laŭ la postuloj de la nuna socio. Kaj ŝajne unu

el la plej gravaj kialoj de la malsukceso de la edukado konsistas en la manka adaptiĝo de la edukadistemoj al la aŭtentikaj bezonoj de la gelernantaro.

Nia moderna socio estas tre ŝanĝema. La sciencaj antaŭeniĝoj estas grandegaj. Ili, kune kun la malapero de tradiciaj valoroj, kaŭzas la malprosperon de la aktualaj edukadprojektoj. Antaŭe, la gepatroj, la najbaroj, ĉiuj, kunlaboris kun la lernejo en la starigo de firmaj etikaj kriterioj. Hodiaŭ okazas la malo kaj pro tio ni piediras kiel mi jam diris supre, blinde.

Nur se la edukado ebligas al gelernantoj akiri la konojn, la lertaĵojn kaj la kutimojn necesajn por ekkomenci la mirindan vojaĝon de la vivo, ni povas paroli pri ebla sukceso. Tamen, ankaŭ pri tio mi ne estas tre optimisma, ĉar la grandega kvanto da konceptoj kiujn ofte oni deziras enkapigi, povas malebligi nepran sintezon.

Kompreneble, pri ĉi tiu temo ni povus paroli longtempe sed, verŝajne, neniam atingus taŭgajn konkludojn por nia ĉiutaga instruista penado. Tial necesas halti kaj enpen-siĝi.

Ĉu nepras enkonduki Esperanton en niajn lernejojn? Probable, kiam granda procento da gejunuloj alproksimiĝos al kolegio antaŭjuĝe (kiel kutime okazas) ili preterpasos la studon de ĉi tiu lingvo ĉar ili ĝin konsideros kvazaŭ alian lecionaron truditan de personoj kiuj tute nescias la bezonojn de la lernantaro. Malgraŭ ke oni ofte jesas la neceson instrui Esperanton en la lernejoj, mi opinias ke, laŭ la vidpunkto antaŭe klarigita, la praveco de tia kriterio ŝanceliĝas.

Probable, kiel preskaŭ ĉiam, solvo troviĝas meze. Eble, oni devas konigi la lingvon per ĉiuj ekzistantaj rimedoj, t.e., per radiofonio, gazetaro, televido, lernejo... sed konsiderinte detale la etosojn en kiuj oni agados. Almenaŭ en multaj landoj ni sukcesos kiel esperantistaj instruistoj serĉante profesorojn en la lernejoj kaj gejunulojn en la radio, en la gazetaro, en televido, en kluboj, ktp. Tiel simple kaj tiel reale.

Ne forgesu ke la influo de la tradiciaj edukadrimedoj estas pli malgranda ol tiu de la amaskomunikiloj de nia socio kaj ke la pedagogiaj, sociaj kaj psikologiaj konoj povas kaj devas esti aplikataj ankaŭ ekster la lernejo.

Propono de la estrarano pri financaj aferoj

Eblecoj por pagado de kotizoj de ILEI-sekcioj en landoj kun neŝanĝebla valuto.

ILEI akceptas membrokotizojn pere de

- a. internaciaj respondkuponoj aŭ
post *skriba* interkonsento kun la kasisto pere de
- b. libroj aŭ
- c. serioj da poŝtmarkoj aŭ
- ĉ. interesaj kolektadoj de bildkartoj aŭ
- d. Esperanto-diskoj kaj sonbendoj aŭ
- e. lerniloj esperantaj aŭ
- f. eĉ prezentado de senkostaj ferioj en belaj lokoj.

La varoj kiuj estos senditaj al ILEI devas esti facile vendeblaj.

La prezoj de la varoj ne povas rilati al la vendoprezio sed nur al la produktaj kostoj. Ankoraŭfoje ni substrekas ke la akcepto de la objektoj okazos nur post *skriba* interkonsento kun la kasisto de ILEI rilate al la kvanto kaj la valoro de la aĵoj.

B. Andreasson

Oficialaj informoj de la Akademio de Esperanto

Nova Serio N° 1
Julio 1983

Sendependa lingvo-instituto fondita de D-ro L.L. Zamenhof en 1905.
D-ro A. Albault, 55 - B, Arcs-St-Cyprien, F-31300 Toulouse, Francio

La Akademio elektis sian novan Estraron; ĝi konsistas el:

D-ro André Albault, el Toulouse, Francio, Prezidanto;

Prof. D-ro Stojan Ĝuĝev, el Sofia, Bulgario, Vic-Prezidanto;

Prof. D-ro Paul Neergaard, el København, Vic-Prezidanto;

D-ro Werner Bormann, el Hamburg, FR Germanio, Sekretario.

Nun baldaŭ la Akademio aranĝos la elekton de novaj Direktoroj por la diversaj Sekcioj, tiel ke ĝi povu plenumi la rolojn por kiuj Zamenhof kreis ĝin.

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Aŭstralujo	: Annie Spencer, 323 Belmont Rd., Tingalpa. Q-4173.
Aŭstrujo	: Mag. Karl Hirmann (estro de SAEI-Societo de Aŭstrijaj Esperanto-Instruistoj) Rannachstr. 3 A-8046 Graz.
Belgujo	: E. van Damme, Albert-I-straat 44, B-1750 Schepdaal. E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout. M. Sondervorst, Rue du Téléphone 1, B-2180 Mettel. H. Lentzen, Feldweg 20, B-4701 Kettenes.
Brazilo	: Elvira Fontes, C.P. 5888, São Paulo.
Britujo	: Hilary Chapman, 34 Llwyn Deganwy Conwy Gwinedd LL3 12RA
Bulgarujo	: Marin Bavec, Postkesto 1054, Sofio.
Danujo	: Lis Thune, Bremsbävänget 15, DK-2650 Hvidovre.
Finnujo	: Pentti Jarvinen. Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82.
Francujo	: Frédéric Le Magadure, 23 rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont.
F.R. Germanujo	: Ruff Karin, Pappelweg 22, D-315 Peine.
Grekujo	: K. Koliopoulos, Plateia Pagratiou 5, strato Pyrou 28, Ateno (506).
Hispanujo	: Andrés Martín Gonzáles, Armengual de la Mota, 33, E-2, 4° D, Malaga-7.
Hungarujo:	: Zsuzsa Barcsay, Ben Kp. 25/b, H-1011 Budapest.
Irano	: M. Saghafian Apt. 7 N. 34 24 th Street. Kuj Nasr Avenue, Teheran 14488.
Islando	: Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, Reykjavik.
Israelo	: D-ro Josef Murian, p.o.k. 1289, IL-61012, Tel Aviv.
Italujo	: Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa, pĉk 11244548.
Japanujo	: Fusakugu Kido, Gamon Higashi 6-51, Kosigaja Saitama 343.
Jugoslavio	: Miodgrad Stojanović, Omladinakih Brigada 49/III/31, YU-11070 Novi Beograd.
Luksemburgo	: Robert Hoenerger, 4 rue des Charbons, Esch sur Alzette.
Malto	: Carmel Mallia, 89 Sanctuary str., Zabbar, Malta.
Nederlando	: D. Luesken-Burger, Boerhavestraat 82, NL-7316 LH Apeldoorn.
Nordameriko	: D-ro Duncan Charters, 25 Elsay Hills Dr Elsay JL-62028, USA.
Norvegujo	: Elling Strand, Ekebergveien 208, Leilighet 154, Oslo 11.
Nov-Zelando	: Gvenda Sutton, 21 Rama Crescent, Wellington 4.
Polujo	: Măg. Barbara Chmielewska, Pedagogia Komisiono de Pola Esperanto-Asocio, UL-Jasna 6, PL-00-013 Warszawa.
Portugaliao	: Antonio Manuel Correia Coimbra, Rua Coronel Leitao 20, 1° Esq. Lisboa Marques.
Sanmarino	: Marina Michelotti, via 25 marzo, 73, I-43031 Republica di San Marino.
Sovetujo	: Johannes Palu, Sõlme 21, SU-200016 Tallinn, Eesti NSV. Nikolaj Starodubcev, Poŝtrestante SU-3-340047 Doneck.
Sud-Afriko	: Axel von Blottnitz, Marcolaan 8, 1700 Florida Glen.
Sudakoreujo	: So Gil Su - Sdemun P.K. 59, Seŭlo 120.
Svedujo	: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24200 Hörby.
Venezuelo	: Esteban E. Mosonyi, Apartado 51500, Chacao, Caracas.

Izolitaj Membroj

Ĉeĥoslovakujo	: Karel Kraft, Zupanovice 49, CS-26214 Hřimezdice Okr. Pribram.
Ĉinujo	: Lu Chien-Bo, Szechuan Universitato, Chengdu, Szechuan.
Germana D.R.	: Till Dahlenburg str. d. DSF 13 DDR-2722 Brühl.
Kubo	: Pedro Pablo Lamas Diaz, Apartado 223, Ciego de Avila.
Malagasujo	: Eugene Raveloson, B.P. 1663-101, Antananarivo.
Singapuro	: Hongi Liao, apt. blk. 14, 2809 H, Eunos Crescent, Singapuro 14.
Zairujo	: Antoine-Samuel Ngangu, B.P. 13, Lukala, Nkandu.

Internacia Lerneja Semajno
okaze de la **Centjara Naskiĝtago**
de **Esperanto**

- I.L.E.I. -

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

invitas
partopreni al

senprecedenta evento ekde la fondo de
la internacia lingvo,
ĉar en lernejo kunvenos gelernantoj
el ĉiuj kontinentoj kaj landoj

ALIĜILO

Mi aliĝas al la 18-a konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

Familia nomo:

Antaŭnomo:

Profesio: Aĝo

Strato: Nro:

Poŝta kodo: Urbo:

Lando:

Mi estas preta prelege analizi la lingvan situacion en mia lando, jes aŭ ne (substreku vian intencon).

Por mia restado (loĝado, manĝado, konferencaj kotizoj) mi devas pagi:

ĝis 15/2/84	8 100 dinarojn
ĝis 15/4/84	8 300 dinarojn
ĝis 15/7/84	8 500 dinarojn

La konferencaj kotizoj ĉe nepartopreno ne estas repageblaj, dokumentoj estos senditaj.

Por ĉiu partoprenanto estu plenigita aparta aliĝilo. Ankaŭ geedzaj paroj faru tion!

Atentu!

Tritaga postkonferenco okazos en la ĉarma regiono de Rijeka. La provizore kalkulitaj kostoj estos tre favoraj. Restado en hotelo kaj uzado de aŭtobuso por unu tago ne pli ol 1 000 dinaroj!

Mi partoprenos la postkonferencon:

..... (skribu jes aŭ ne)

.....
subskribo

Estraro de ILEI

Prezidanto: rektoro Helmut Sonnabend, Pappelweg 22A, D-315 Peine, F R Germanujo.
Vicprezidanto: Anica Hurčak, Polic-Kamova 91/III, YU-51000, Rijeka, Jugoslavio.
Sekretario: d-ro prof. Mario Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa. Italujo.
Vicsekretario: prof. Francisko Zaragoza Ruiz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante, Hispanujo.
Financoj: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl 455, S-24200 Hörby, Svedujo.

Kunlaborantaj Organizo

EEC Eŭropa Esperanto-Centro, Rue Montoyer 37, bte 24, B-1040 Brusel (Belgio).
Konstanta reprezentanto de ILEI ĉe E.E.C.:
S-ino Elfriede Ernst, 154 Blvd. de Smet de Naeyer bte 7, B-1090 Brussel.
FIMEM Fédération Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne - 35 Avenue
Jottrand 1030 Bruxelles - Belgique. Tel. 02 277 49 36.
ICEM Esperanto - I, rue Galissonnière - F - 44330 Le Pallet - Francio.
SAT Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris.
UEA Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.
UNESKO Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj, 7 Place Fontenoj, F-75007 Paris.
Konstanta Reprezentanto de ILEI ĉe Unesko:
Prof. James Fairbank, 6 Avenue Théodore Rousseau, F- 75016 Paris (tf. 6479187).

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO — IPR

en rilatoj de reciproka informado kun Unesko, Kategorio C

Aperas trifoje jare

redaktas: Helmut Sonnabend, Pappelweg 22A, D-315 Peine,
FR Germanujo

Membreco en I.L.E.I. (30 svedaj Kronoj jare) inkluzivas la ricevon
de IPR.

abonprezo por nemembroj: 30 svedaj kronoj (inkluzivas afrankon kaj
aerpoŝton)

Kontoj:

1. poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). La Internacia Ligo de
Esperantistaj Instruistoj - ILEI . Södra Rörum
pl. 455. S- 242 00-Hörby. (Svedujo)
2. poŝtĝirkonto: 3789 64 — I.L.E.I. 2814 —
UEA NL Rotterdam 3007 — Nieuwe Binnenweg 176.

manuskriptojn sendu duoble (skribmaŝine) al la redaktoro

18-a Internacia Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

en

**Ŝkofja Loka Slovenio/Jugoslavio
de 14 - 21 aŭgusto 1984**

Temo de la Konferenco:

**Esperanto – la alternativo
en la sistemo de fremdlingva instruado**

Konferenca Adreso:

Slovenia Esperanto-Ligo
Organiza Komitato por ILEI-Konferenco
YU-61 000 Ljubljana, Rimska 7
Tel.: 0038 61/225-111

Konferenca Konto:

Zveza Druŝtev Za Mednarodni Jezik Esperanto
Slovenia Esperanto-Ligo
L.B. Gospodarska Banka
Ljubljana 50100-620-107-257300-10273/3

ALVOKO – ALVOKO – ALVOKO – ALVOKO – ALVOKO – ALVOKO

Internacia Lerneja Semajno (ILS) aŭ aŭtune 1986 aŭ printempe 1987.

La kontribuo de **ULEI** al la Jubilea Jaro estos la prezentado de Internacia Lerneja Semajno (ILS).

Estos demonstrande, ke per Esperanto eblas organizi senprecedantan lernejan instruadon al infanoj kaj pli aĝaj gelernantoj el kvin kontinentoj kaj krei inter ili tiun etoson kiun ebligas komuna lingvo.

Partoprenrajtaj estas junaj homoj kiuj atingos 1986/1987 la aĝon inter 10 kaj 15 jaroj, escepte ankaŭ, se ili limiĝos 1986/87 al 9 aŭ 16 jaroj.

Partoprenontaj internaciaj lernejoj havu la lingvan nivelon postulata en lingvaj ekzamenoj por lingva kapableco.

De ili devas esti plue postulataj, ke ili laŭ konduto estu la "ambasadoroj" de siaj landoj.

Invitataj estas infanoj kaj gelernantoj el ĉiuj kontinentoj kaj landoj.

La nombro de la ILS estas limigita al 80 ĝis 90 lernejoj.

Jam nun estas bonvenaj ĉiuj geinstruistoj el ĉiuj kontinentoj kaj landoj dezirantaj ekde nun kunlabori por la sukcesigado de la ILS, ĉu ili nur zorgu en la propra lando por la preparo de la gelernejoj aŭ ĉu ili deziras instrui en la ILS.

Ĉiuj formos la Internacian Kolegarion (IK).

Gekolegoj pretantaj esti anoj de IK bonvolu plenigi la apudan demandaron kaj sendi ĝin al Helmut Sonnabend, Pappelweg 22 A, D-315 Peine.

La loko de la ILS estos ankoraŭ fiksata, eble en Germanio.

ALVOKO – ALVOKO – ALVOKO – ALVOKO – ALVOKO – ALVOKO

Aliĝo al Internacia Kolegiaro de Internacia Lerneja Semajno 1986 aŭ 1987

NOMO _____

Voknomo _____

Aĝo _____

Strato _____

Loĝloko _____

Lando _____

Kontinento _____

Mi estas preta,

rekte instrui en la Internacia Lernejo en 1986/1987

aŭ/kaj

fari mian eblon por prepari gelernejojn por la ILS.

substreku la deziritan frazeton!

Konciza informo pri mia persono (fakoj, ekzamenoj ĉefe en Esperanto, pri praktikaj spertoj en lingva instruado, partopreno en aranĝoj por infanoj/gejunuloj,

Subskribo

Nepre!

*Resendu ĝis la fino de 1983!
Plej malfrue en Januaro 1984!*